

Internacia Esperantista
SEMAJNO-KONGRESO

Gento (Belgujo)

14 - 20 Aŭgusto 1913.



Kongreslibreto.

E

3

Granda HOTELO

Rue de Flandre

(Rondpoint) GENTO

DORMO-ĈAMBROJ

kun la plej bona moderna
komforto

Elektra Lumigo,

Centra Varmigo.

MALKARAJ PREZOJ

TELEFONO N° 1546°

HENRI SELENS N.I.D

ANTAŬPAROLO.



74/2388

Gento, la « Urbo de la Floroj » fariĝas famkonata tra la tuta mondo pro la belega kaj admirinda Ekspozicio tutmonda kaj internacia, kiun ĝi organizis en siaj muroj. Miloj kaj miloj da fremduloj ĉiulandaj alfluas al tiu grandioza elmonro de vivpleneco, komercemo kaj industriemo por admiri la ĉiuspecajn produktaĵojn ne nur de nia malampleksa patrolando sed ankaŭ de tiuj de preskaŭ ĉiuj civilizitaj ŝtatoj.

Sennombraj estas la kongresoj kiuj okazis kaj ankaŭ okazos en la Ekspoziciurbo, sekve sin kunigas tie-ĉi reprezentantoj de artoj, industrioj, sciencoj, sportoj, turismo, religioj, k. t. p.

Ni, Esperantistoj, probatalantoj, pioniroj de la monda paco, ne povis neuzi tiun okazon por montri nian vivoplenecon, niajn progresojn, nian fortecon, nian multnombrecon. Tial nia Genta-Grupo decidis, kune kun tiu de la antaŭurbo Gendbrugge, organizi grandiozan manifestadon por nia sankta Afero kaj nia kara lingvo.

Sub la gvidado kaj estrado de la Belga Ligo Esperantista estis starigata Komitato kie, krom reprezentantoj de la suprecititaj du grupoj, sidas kelkaj membroj de aliaj agemaj grupoj belgaj.

Jam de antaŭ la malfermo de l'Ekspozicio, la Komitato eklaboris por la sukceso de nia entrepreno : kunigi aron multenombrian da ĉiulandaj gesamideanoj en nian urbon, al kiuj ni volas montri la povon, la forton, de nia paca armeo. Tamen, decas ankaŭ ke tiu kunesto ne perdiĝu

en nuraj amuzajoj; tial oni decidis kunigi en kongreson, la geanaron, kaj tiel estis kreita la Esperantista-Semajno-Kongreso.

Vera Semajno estos tiu Esperantista Festo, ĉar ĝi daŭros sep tagojn. Ĝi plie ricevis la nomon de Kongreso, ĉar oni pritaktos, dum la laboraj kunsidoj, la nuran sed gravan demandon: kiuj estas la plej taŭgaj, la plej efikaj rimedoj por propagandi nian Lingvon? »

La penadoj de l'organiza komitato estas plene sukcesintaj: efektive pli ol 500 geanoj, el ĉiuj partoj de Europo kaj eĉ de Ameriko enskribiĝis kaj plenigos la stratojn de nia urbo kaj la aleojn kaj halojn de nia Ekzpozicio, dum sep tagoj.

La geesperantistoj Amikoj certe ne pentos pri sia vojaĝo al Gento: multenombraj estos la festajoj ĉiuspecaj per kiuj la komitato klopodados agrabligi ilian restadon tie-ĉi. Facilaĵojn kaj rabatojn ĉiajn ĝi obtenis por ili. (vidu detalojn je l'fino de la libreto.)

Al ĉiuj ni deziras koregan bonvenon, agrablan restadon kaj ni havas la firman konvinkon, ke nia I. E. S. K. efike propagandos nian karan lingvon kaj plifirmigos la laboremon ĉe ĉiuj por nia admirinda kaj laŭdinda Movado!

La organiza Komitato.

Priskribo pri GENTO.

A. Historia kaj geografia noto.

Gento (franclingve: Gand; flamande: Gent) kalkulas 165.000 da loĝantoj kaj estas la ĉefurbo de la provinco « Orienta Flandrujo ». Ĝi estas lokita sur la kunfluigejo de la riveroj « Escaut » (Schelde) kaj Lys (Lei) kiuj formas, kune kun la multaj kanaloj kiuj trafluas la urbon, 13 insulojn, interligitajn per 80 pontoj.

Gento ekfondiĝis en la VII^a jarcento; tamen ĝia teritorio estis enlogita jam dum la roma epoko. La urbo plietendiĝis ĉirkaŭ du abatejoj, fonditaj de S^{ta} Bavo.

Je la komenciĝo de la XIII^a jc., Gento iĝis la ĉefurbo de Flandrujo kaj de ties grafoj; de tiu tempo ĝia graveco materia kaj politika kreskis rapide. Jam en 968 estis enportata la teksado, kies korporacioj devigis la ŝtatestrojn donaci al ili multe da liberecojn.

Ludoviko XVIII^a, reĝo de Francujo serĉis kaŝejon en Gento dum la « Cent Tagoj ».

Gento estis, precipe dum la XIII^a, XIV^a kaj XV^a jc. la scenejo de sangaj ribeliĝoj; tiel dum la regado de Filipo la Bona kaj de Karolo Kvina. La Gentanoj, ĉiam kuraĝaj kaj sendependemaj militadis ofte, kaj ne ĉiam sen sukceso, kontraŭ la Reĝoj de Francujo.

La plej interesinda kaj fama viro de la XIV^a jc. estis Jakobo d'Artevelde (1287-1345) nobelulo, sed dekanato de la 52 korporacioj. Li estis fama administranto, kiu regis diktatore la Graflandon dum multaj jaroj. Li kontraktis gravajn komercajn traktatojn kun Anglujo.

Gento partoprenis en en la XVI^a jc. la protestantisman movadon kaj sekve konatiĝis kum la abomenaĵoj de l'Inkvizicio de la « Duko de Albo » kapitano de

Pilipo II^a. La « Katolika Restoracio » elpelis la protestantojn, inter kiuj troviĝis la ĉefaj komercistoj kaj industriistoj; tio-ĉi kaŭzis la ekruiniĝon ekonomian de la urbo.

En 1800, la enporto de la maĥanika teksomaniero de « Liévin Bauwens » nova « gemeco » naskiĝis en Gento, kiu estas nun unu el la plej grandaj fabriкејaj urboj de la kontinento.

Neniu ignoras ke Gento estas eble la plej grava centro de florkulturado de la mondo.

Ĝi enhavas multajn stratojn, placojn, kajojn, dokojn, bulvarojn, ŝoseojn, vendejojn, publikajn ĝardenojn, k. t. p. k. t. p.

Priskribo pri GENTO.

Antaŭa Rimarko : La personoj, kiuj volas dediĉi tagon al vizito de la urbo, agos prave sekvi la vojplanon kiun ni ĉi-sube donas; tiamaniere ili vidos, en unu promenado, ĉiujn ĉefajn vidindaĵojn de la urbo, kiuj tamen estas tiel multenombraj.

La negranda amplekso de tiu-ĉi libreto, permesas al mi doni nur kelkajn vortojn da priskribo aŭ klarigo pri ĉiu vidindaĵo.

* * *

Ni komencu nian trairadon de la

Suda Stacidomo

kiu estas unu el la plej belaj kaj bele florornamitaj el la lando. Forlasante la placon antaŭ ĝi ni eniru la

Flandrujan Straton

kies belaj domoj, magazenoj butikoj, luksaj estas vere vidindaj kaj donas al ĝi aspekton de grandurban straton.

Je la ekstremaĵo ni ekvidas la

Statuon de Liévin Bauwens

(vidu la antaŭan ĉapitron.) Je nia dekstra flanko staras

La Kastelo de Gerardo la Diablo

Landsinjora fortikigita loĝejo de la XIII^a jc., kiu enhavas belan kripton. La konstruaĵo utilas nun kiel arkivejo. Iom pli malproksime kusas la

Katedralo Sankta Bavo

bela kaj majesta preĝejo, kies kripto datumas de 942. La Ĥorejo estas de la XIII^a jc. sed la malalta parto estis konstruata en la XVI^a jc. Ĝi enhavas multajn arttrezorojn, inter aliajn :

« La adorado de la Ŝafido » pentraĵo de la fratoj Van Dyck kaj « La Predikseĝo » skulptita de la Gentano Laurent Delvaux (XVIII^a jc.)

Antaŭ la katedralo etendiĝas placo, ĉirkaŭita dekstre de

La Flamanda Teatro

nuntempa konstruaĵo kaj en la fundo

La Belfrido (Sonorilejo)

tiu turo, simbolo de la urba libereco kaj gardisto de ĝiaj privilegioj, estis konstruata en la komenciĝo de la XV^a jc. La supra parto estas tutnove rekonstruita. La dragono, kiu ĝin superstaras estas el 1377. La domo kiu kuŝas kontraŭ ĝi estas

La Draphalo

komencita en 1425 ĝi estis finata en 1903. Ĝi estas la sidejo de la « Societo pri Historio kaj Arkeologio » kaj de la fama « Reĝa gildo de Sankta Miĥaelo ». En ĝia kripto oni organizis biervendejon, nomata « Ratskeller ». Ni direktas nin dekstren kaj alvenas sur la « Putervendejon » kie ni admiras.

La Urbdomon

kunmetita el diversaj partoj. La flankajo, laŭlonge de la « Rue Haut-Port » estas unu el la plej belaj specimenoj pri gotika arkitekturo el Belgujo; antaŭ la butervendejo etendiĝas parto, konstruita unu jarcenton poste. La centra parto, kiu enhavas la konsilantaran salonegon kaj la « Armilejon » estas el la XV^a jc. : aliaj flankajoj datumas de la XVII^a kaj XVIII^a jc.

Daŭrigante ĉiam antaŭen ni alvenas al la

Preĝejo Sankta Nikolao

la plej malnova de la urbo, komencita en la X^a jc. Forbruliĝinta en 1120, pli poste en 1429, ĝi estis finata en XV^a jc. Ĝi enhavas rimarkindajn ĉefverkojn.

Ni supreniru nun la belan larĝan ponton fiksan, kiu kuŝas antaŭ ni kaj haltas je la mezo de ĝi. Antaŭ ni, ni nun ekvidas la

Preĝejon Sankta Miĥaelo

preĝejo granda kaj bela de la XV^a jc. kaj antaŭ nelonge restorita.

Ĝia turo estas ne finita; ĝi enhavas ĉefverkajn pentraĵojn. Ni nun turnas nin je la kajo, kiu kuŝas dekstre de ni, kaj ekvidas serion da belaj antikvaj arte restorigitaj konstruaĵojn; inter aliaj :

La domo de la Boatistoj

el 1531, sidejo de la gildo de Boatistoj; Kontraŭ ĝi :

La Grenmezurista Domo k. t. p.

Ni daŭrigu laŭlonge de tiu-ĉi kajo kaj alvenas sur la Legomvendejo, kie staras

La Viandvendejo

Kiu nun utilas kiel ŝtata poŝt- kaj veturilejo. Oni eltrovis en ĝi surmuran pentraĵon de 1448.. Flanke de ĝi oni vidas

La Pendigilejon

kie okazis la senkapigoj. Ni transpaŝas la ponton kaj alvenas sur la

Placon « Sankta Paraildo »

ĉirkaŭita de domoj, ĉiuj antikvaj kaj tre interesaj, kiuj faras el tiu loko unu el la plej rimarkindaj el Eŭropo; precipe pro la majesta

Kastelo de la grafoj

Konstruita en 1180 de Pilipo de Alsasujo, grafo de Flandrujo, aŭ pli ĝuste, rekonstruita sur la ruĥoj de kastelo el la IX^a jc. (nun ankoraŭ bone videblaj,) ĝi prezentas ĉefan intereson je historia kaj arĥeologia vidpunktoj. Specimeno unu nura en la mondo, nenia feŭdala fortikaĵo estas komparinda kun ĝi. Ĝi utilis kiel sidejo de la Flandrujaj grafoj, kiel malliberejo, komercaj-deponejo, kotonŝpinejo(!) k. t. p. Nun ĝi estas plene aranĝata kaj restarigata en sia unua stato kaj elmetita je l'admiro de ĉiuj artaĵamantoj.

Post promenadeto da 10 minutoj ni alvenas je la

„ Rabot „

malgranda fortikaĵo, flankedefendata de du turetoj; estas memoraĵo pri la heroaĵo de la flandraj gildoj, kies kuraĝo malhelpis ke Frederiko II prenis la urbon. Revenante ni trapasas la

Princan Kortegon

kie ni vidas arkaĵon; estas lasta postsigno de la palaco, kie naskiĝis Karolo V. Iompli malproksime ni renkontas konstruaĵon preĝejaspektan. Estas efektive iama preĝejo sed nun ĝi utilas kiel

Muzeo de Antikvaĵoj

kio enhavas trezoraĵojn kaj memoraĵojn multenombrajn

kaj ĉiuspecajn pri la historio de Gento. Nia gvidanto nin kondukas tra la "Quai de la Grue", kie ni povas admirii kk. tre vidindajn malnovajn domojn ĝis la

Granda Kanono (aŭ) Bombardilo;

ĉiuj certigas ke tiu grandega bombardilo utilis por pafjeti grandajn ferajn kuglegojn, dum iu milito. Oni ĝin nomas: "Margrito la Furiozulino"; ĉiuj fremduloj ĝin admiras prave. Ni retournante ni faras kk. paŝojn kaj alvenas sur la

Vendreda Vendejo

Estas la forumo genta. Tie - ĉi kunvenis dum jarcentoj la genta popolo, ĉiufoje kiam ĝia libereco estis minacata; tie - ĉi ili prenis ĉian gravan decidon pri la liberigo de la patrujo en danĝero; tiu placo restos ĉiam la simbolo de la liberamo kaj libereco de la genta popolo. La noma de la placo sufiĉe elmontras ke ĝi estas vendejo, kiun ĉiuvendrede centoj da budetoj surkovras, kie urbanoj kaj kamparanoj intermoviĝas por vendi kaj aĉeti ĉiuspecajn aĵojn. Meze de ĝi staras la bronza

Statua de Jakobo Van Artevelde,

tiu - ĉi viro, alnomata la "Saĝulo de gento", Oferdonis sian rikaĵon, sian vivon por la genta popolo, kiun li savis pli ol unu fojon je la mizerego kaj la malsato. La preskaŭ ĉiuj malnovaj domoj, kiuj ĉirkaŭas la placon strange kontrastas kun la grandaj, altaj konstuaĵoj de la socialista societo "Vooruit", (antaŭen). En la kontraŭa angulo ni vidas la

Tureton

kiu surkovras la antikvan sidejon de la mezepoka ledprestigista gildo. Malantaŭe de ĝi elstariĝas la tri turoj de la

Preĝejo Sankta Jakobo

kaj en la fundo ni rimarkas la

Flamandan Akademiejon.

Tiuj, kiuj havas bonajn krurojn nin sekvu, ĉar kvaronon da horo ni bezonas por iri ĝis la

Ruinoj de la Abatejo Sankta Bavo.

Estas restaĵo de Abatejo, fondita de Sankta Amando ĉirkaŭ 640; ĝi estis rekonstruata dum la X^a jc. Karolo V disjetigis parton por konstrui sur ĝia loko citadelon (fortikaĵon) «La kastelo de l'Hispanoj» de kiu ekzistas nur ankoraŭ kelkaj postsignoj.

La partoj, de Karolo V konservitaj, estis detruataj parte de la Kalvinistoj kaj parte dum la unua duono de la pasinta parcento. La restaĵoj tamen estas tre interesindaj. En la iama manĝejo estas aranĝita «Ŝtonmuzeon» tre vidindan, kiu enhavas kolektaĵon da tombaj ŝtonoj plej riĉan el la mondo. Antaŭ tri jaroj oni eltrovis la skeletojn, kie estas videblaj ĉe la enirejo.

Nur dek minutoj nin disigas de la

Granda Beginejo de Mont-Saint-Amand.

La beginejoj, (Begino- anino de Sankta Begga) fonditaj en XIII^a jc., estas unu el la plej interesiĝindaj vidindaĵoj de Gento. Estas veraj malgrandaj urbetoj, ĉirkaŭitaj de muroj, kaj kiuj komunikas kun la urbo nur per pordo, fermata vespere. Enirante ilin, la vizitantoj sentas sin kvazaŭ transportitaj en la pasintecon.

La beginoj ne faras religiajn promesojn, sed portas religian kostumon; ili estas submetitaj al regularo, sub la aŭtoritateco de estrino, nomata «Granda Fraŭlino» elektita de ili. Ili okupiĝas plej grandparte pri kudrado kaj kelkaj pli flegado de malsanuloj. En Gento mem, ekzistas ankaŭ

Granda Beginejo

la plej bela el Eŭropo, sed bedaŭrinde destinŝanĝata

dum 1873. Ĝi estis anstataŭita per la suprecita el Mont-St-Amand; tiu lasta estis konstruata antaŭ malmultaj jaroj. La

Malgranda Beginejo

(Longa violeta strato) estas ankaŭ ege vidinda.

De Mont-St-Amand, ni veturas tramveturilo urben, por halti sur la grenvendejo. Tie ne devas nepre admiri la novan

Poŝt- kaj Telegraficejon

novan konstruaĵon artan; poste ni promenadas tra la

Kamparstrato

unu el la plej popolhavaj de la urbo; je ĝia ekstremaĵo ni vidas la

Juĝejon

konstruaĵo en klasika stilo; maldekstre staras la

Granda franca Teatro

kiu enhavas belegajn koncert - kaj balsalon - egojn, kaj fine ni alvenas sur la

Armilejon (place d'Armes)

beleta placo, plantita per du vicaroj da ulmoj kaj sur kies kiosko okazas oftaj koncertoj; estas la rendevuejo de la genta loĝantaro. Ĝin ĉirkaŭas belaj hoteloj kaj domegoj; inter aliaj.

La Borso,

La Klubo de la Nobeluloj

eleganta hotelo en stilo Ludoviko XV^a, la

Bankoj

k. t. p.

Gento enhavas ankoraŭ multajn statuojn, preĝejojn, promenadejojn, bulvarojn, koncertejojn, bibliotekojn, muzeojn, hospitalojn, maljunulejojn, orfanejojn, k. t. p.

M. SEBRUYNS.

Vizito al la Ekspozicio

Ni eniru la Ekspozicion tra la « Ĉefa Enirejo ». De tie ni ĝuas ĝeneralan vidaĵon sur la konstruaĵoj de la Ekspozicio. Antaŭ la pordegoj kaj malsupre de la ŝtuparo staras 4 kolosaj bestoj, emblemoj de la forteco. Enirinte, ni alvenas en la *kupolon*, sur kies supra parto estas belaj pentraĵoj. Antaŭ ni kuŝas la *Honorkorto*, granda korto ŝtonplate pavimita, kiu estas ĉirkaŭigita de parto de la *belgaj Haloj*. Je la ekstremaĵo de la honorkorto troviĝas la *Ĝenerala Direktejo* kaj, sur la mala flanko: la *Publika Centra Oficejo de la Poŝto, Telegrafo kaj Telefono*.

La halo maldekstra estas tiu de *Anglujo* kaj dekstra de *Francujo*. Antaŭ ili etendiĝas *kolonadoj* Louis XVI stilaj.

La *statuo* kiu staras meze de tiu-ĉi aleo, estas tre artoplena kaj nomiĝas « *Ros Beiaard* ». Ni admiru ankaŭ la *akvuĵegon* kaj la *grupon skulptitan* je ties ekstremaĵo.

Antaŭ la suprecitita aleo montriĝas la bela *Palaco de la Belartoj*, kiu enhavas riĉegan kolekton da pentraĵoj, skulptaĵoj kaj la salonon de la *fotografarto*.

Irante dekstren ni alvenas en la *Aleon de la Nacioj*, je kies flankoj staras, sur longeco de 1 kilometro, la konstruaĵoj kaj palacoj en malsimilaj elegantaj stiloj.

Maldekstre, ni unue renkontas la *Pavilonon de Persujo*, kun ĝiaj strangaj arabeskoj kaj ĝia fasado diverskolora; poste venas: la luksa *Palaco de l'arĥitekturo*, la *Itala Sekcio*, kie oni trovas multekostajn artobjektojn ĉiuspecajn, kaj kiu estas bongusta imitaĵo

de « florentena palazzo » ; la *Palaco franca de l' Nutraĵoj*. kie bongustaj vinoj precipe allogas la vizitantojn ; la ĉarma *Holanda Pavilono*, pura kaj beleta kiel la lando, kiun ĝi reprezentas : la grandega kaj bruoplena *Maŝinhalo* de kiu oni eniras en la belegan kaj brile lumigitan *Lumpalacon*.

Je la dekstra flanko de la *Aleo de la Nacioj* etendiĝas la kolonadoj kaj portikoj de la *franca Sekcio*. Tiu-ĉi meritas specialan mencion, tiom pro la ampleksa lokon, kiun ĝi okupas kiom pro la diverseco kaj beleco de la produktaĵoj elmetitaj. Je la angulo de tiu sekcio, staras la *Pavilono de la urbo Parizo*, tre vidinda kaj lerniga salonego.

Je la finiĝo de la vojo, kiun ni sekvas dekstren, elirante la « Urbo de Parizo » troviĝas la enirpordego de la *Malnova Flandrujo* ; ni diru, pro mallongeco, ke ĝi estas fidela reproduktaĵo de urbo flandra en la pasintaj tempoj ; oni sin kredas ja transportita en epoko tre malnova, vidante la domojn, placojn, kostumojn kaj eĉ kutimojn kaj morojn tiel vere reproduktataj de ĉio, kio nin ĉirkaŭas.

Tiu vizito interrompis nian revuon de la naciaj sekcioj. Retrapasinte la saman pordegon de Malnova Flandrujo, ni ekvidas je nia dekstra flanko, la *Germanan Sekcion*, konstruaĵo iom peza sed tamen bela, La ronda palaco kontraŭ kiu ni nun staras estas la *Kolonia Palaco*. Ĝi enhavas ĉion vidindan kaj interesindan pri nia kolonio « Kongo » kaj belegan admiregindan *Panoramon*.

La plilongigo de la aleo enhavas, maldekstre, la *Palacon de Kanadujo*, grandioza konstruaĵo, kiun superstaras alta turo, poste venas : la *Halo de la Fervojaĵoj*, enhavanta ĉiajn specimenojn de novaj kaj malnovaj lokomotivoj, vagonoj, k. t. p., kontraŭ ĝi

vidiĝas malgrandaj, sed ne malpli belvidiĝaj pavilonoj : la *Urbo Ostende*, la *Princlando Monaco*, la *Canadian Pacific Railway* ; en tiu lasta pavilono oni povas senpage ĉeesti kinematografajn riprezentadojn.

Forlasinte tiun lastan, ni turnu maldekstren, ni estas en la *Aleo de Bruselo*, tie ni vidas la *Hispanan Sekcion*, kaj je l'ekstremaĵo kuŝas la *Komunuma Placo*, sur kies kvar anguloj staras la *Pavilonoj* de la kvar grandaj urboj : *Bruselo*, *Antverpeno*, *Lieĝo* kaj *Gento*.

Daŭrigante ni eniras la *Aleon de Lieĝo*, tie staras dekstre : *La Haloj de la belga kaj franca Plivastiĝadoj* maldekstre, la *Internacia Halo* ; tiu ĉi enhavas vendejojn, elmontrejojn, bazarojn, k. t. p. kies komercaĵoj devenas el ĉiuj landoj de la kvin mondpartoj.

Tre proksime de tiu-ĉi halo, etendiĝas alloga konstruaĵaro, ĝi estas la *Moderna Vilaĝo* ; ĝi estas vera vilaĝo kun ĝiaj puraj, per ĉiuspecaj kreskaĵoj beligitaj domoj, farmbienoj, ĝia lernejo, ĝia preĝejo, k. t. p. ĉio konstruita laŭ la principoj de higieno kaj ekonomio.

La grandega ebenaĵo, kiun oni ekvidas proksime de la Vilaĝo, estas la *Sportejo*.

Por ripozigi iom niajn kruojn lacigitajn, ni supreniru la *malgrandan tramveturilon Decauville* (laŭ la nomo de l'eltrovinto) ; ĝi veturigos nin tra la belaj ĵus trapaŝintaj aleoj ĝis la *Aleo de l'Belvidejo* (belvédère) je kies du flankoj staras multe da *Biervendejoj* kaj *Restoracioj*, kaj ankaŭ *Malgrandaj Pavilonoj* de apartaj ekspozantoj ; traveturinte tion-ĉi ni alvenas al la


Parko, aliformigita por la cironstanco en « *Atrakcieoj* » (t. e. : ejo por allogaĵoj.) Oni tiel nomas en Ekspozicio, ĉiuspecajn amuzaĵoj, kien la vizitantoj venas por sin amuzi kaj ripozi post laciga vizitado de la haloj kaj pavilonoj. En tiu atrakciejo ni vidas : la *Water-Chute*

(Enakvofalejo) la *Scenic-Railway* (fervojo enmontara) la *Enŝorĉigita domo*, la *Vizito al la Minejo*, la *Senegala Vilaĝo* k, t. p. k. t. p.

Ankaŭ en la Parko troviĝas la diversaj *Pavilionoj de la francaj kolonioj*, kie oni elmetas la produktaĵoj de la malproksimaj riĉe sunlumigitaj landoj.

La *Muzeo de la Belartoj* enhavanta riĉan kolektaĵon da pentraĵoj kaj nuntempe la nekompareblajn trezorojn de la *Malnova Arto en Flandrujo* ankaŭ troviĝas tie-ĉi.

Fine, en la centra parto de la Parko, stariĝas la giganta konstruaĵo de la *Festpalaco*, kies *florvarmejoj*, je supraĵo da 30.000 kvadratmetroj estas senintermanke mirinde florprovizitaj. Tiuj florvarmejoj enhavas, dum la du « *Floralie'oj* » (ekspozicioj de floroj) sufiĉegaĵojn da floroj la plej maloftaj kaj la plej belaj, kiuj miregigas la vizitantojn.



Kelkaj sciigoj utilaj por la gekongresanoj.

Rabatoj : La komitato de la Atrakcioj konsentis rabaton da 50 0/0 sur la enirprezo por la « Malnova Flandro » kaj da 25 0/0 en ĉiuj ceteraj amuzigaĵoj.

La hoteloj. La organiza komitato starigis en sia mezo: sektion por la loĝdo, kies estrino estas *Fino R. Schepens*, rue Charles-Louis Dierickx, 14, Gento. Tiu komitato zorgis por logejoj por ĉiuj gekongresanoj, kiuj petis pri tio. Tamen ni aldonas tie-ĉi mallongan liston de kelkaj hoteloj, sed ni ne estas respondaj pri ilia servado.

Flandria Palace : kontraŭ la stacidomo Saint-Pierre, 500 litoj.

La Poste : place d'Armes. en la centro de la urbo, 200 litoj.

Ganda

Grand - Hôtel

Hôtel de Termonde

Hôtel Métropole

Hôtel de Londres

Regina

} en la najbaraĵo de la Suda Stacidomo } 50-75 litoj.

Tramveturiloj : La n^oj 4, 5 & 7 haltas antaŭ la enirejoj de la Ekspozicio (nur 5 & 7 antaŭ la ĉefenirejo.) Oni pagas 10 centimojn en 2^a klaso, 15 c. en 1^a kia ajn estu la distanco. El kaj al ĉirkaŭ urboj : 5 c. pli.

Veturiloj. de 6 h. al 23 1/2 h. 1 frankon po 1/2 horo ; 0.50 fr. po ĉiu 1/4 da horo pli. De 23 1/2 ĝis 6 h. : 2 fr. po 1/2 horo ; 0.75 fr. po ĉiu 1/4 da horo pli.

Auto-taxis : Tage : 1^a kilometro : 0.90 fr. kaj 0.10 fr. po ĉiu partumo da 200 metroj.

Nokte : 1^a kilom. 1.50 fr.

Akceptejo : (malfermita de 9^a matene ĝis 18^a posttagmeze) lokita : Voiderstraat, Rue des Foulons, je 5 minutoj de la Suda Stacidomo. Tie oni havigos ĉiujn informojn.

Sidejo de la Genta Grupo Esperantista : Place Laurent, je l'ekstremaĵo de la Flandruja strato, je 5 minutoj de la Suda Stacidomo.



Listo de la aligintoj enskribintaj antaŭ
la 5ⁿ de Aŭgusto 1913.

ANGLUJO.

- | | | | |
|---|-------------------------|---------------------------------|---------------------------|
| 224. S. Rhodes Mariott | <i>Ashton on Mersey</i> | 242. S. B. E. Long | <i>Harrow</i> |
| 225. S ^{no} Rhodes Mariott | <i>Cardiff</i> | | <i>Hartlepool</i> |
| 260. S. Jones D ^o Rhys | | 270. S. Jones J. Archill | <i>Hastings</i> |
| 261. S ^{no} » » » | | 285. S. Jurner John | |
| 262. F ^o » » » | <i>Cheltenham</i> | 293. » A. J. Adams | |
| 171. S ^{no} I. L. Buttler | <i>Bradford</i> | 294. » Merrick | |
| 258. S. J. H. Holmes | | 302. » J. J. Boutwood | <i>Kingston on thames</i> |
| 259. S ^{no} » | <i>Darlington</i> | 318. S. J. M. Sexton | <i>Leek</i> |
| 267. S ^{no} A. Ryan | <i>Dover</i> | 54. S. Wilson John | |
| 174. S ^{no} Finez Julien | <i>Dublin</i> | 55. S ^{no} » » | <i>Knottingley</i> |
| 257. S. Johnston D ^o Jameson | | 333. S. Egerton | |
| 268. S. Ball J. C. | | 334. S ^{no} » | <i>Letchworth</i> |
| 269. F ^{no} » » | <i>Eastbourne</i> | 187. S. Goodliffe Frederic | |
| 176. S. West Edgard | | 294. F ^o Bartholomew | |
| 190. » Robinson G. P. | | 265. F ^o Pentelow | <i>London</i> |
| 191. » Nix John | <i>Eastkirkby</i> | 99. S. Simpson Robert | |
| 193. F ^o Berd Florence | <i>Exeter</i> | 161. » Gosling Cyrill | |
| 299. F ^o A. Schapley | <i>Glasgow</i> | 162. » » G. O. | |
| 159. S. Buchanan Georges | <i>Grange-overlands</i> | 175. » Bellamy Doro | |
| 178. S. Pratt. W. C. | <i>Greenwich</i> | 188. » Hill Harrisson | |
| 245. S. Simpson Ferd. | | 189. » Potton John | |
| | | 192. » Heymans Leo-Louis | |
| | | 263. » Theodore | |
| | | 272. F ^o Sinnotte | |
| | | 273. » E. Fryer | |
| | | 274. S. Travis C. Nelson | |
| | | 275. S ^{no} E. Wright | |

276. S. J. Hall
277. » J. R. Jayne
290. » D^{ro} E. A. Cook
191. F^o » »
292. S. D^{ro} Pollen
295. » M. J. Arriffin
296. » T. Simpson
297. » J. F. Dinslage
298. S^{no} »
303. » H. A. Epstein
304. » A. Mudie
305. » H. B. Mudie
306. F^o »
323. S. Fairman Ch. Arth.
Polegate
177. S^{no} Sumfield
Sussex
288. S^o V. V. Sumfield
289. S^{no} »
Shipley
215. S. Barker
216. S^{no} »
Putney
231. S. Howard Murray
Jackson
Tauton
266. F^{no} Fison
Torquay
300. F^{no} T. Wilkes
Wallasey
301. S. chas. C. Elliott
Windsor
233. S. Poivers N. E.
234. F^o Thompson
- SKOTLANDO
- Kilwinning*
244. S. Liptrot Richard

BRAZILLANDO

Rio de Janeiro

95. S. Couto Fernandes
Albert
134. Boiteux Georg. Arthur

BELGUJO

Anvers

31. S. Vermandel Arthur
32. S^{no} » »
34. S. » Leon
35. » Rynders Fraçois
37. Grupo verda standardo
50. S. Nere Bernard
59. » Danis Constant
60. » Dekoning Willem
62. » Marcus Ludoviko
63. » Van Schoor Oscar
64. » Vega Emile
65. F^{no} Sebus Henriette
76. S. Willekens Emile
77. » Cassiers C. Ant.
78. » Verheugen Joseph
79. » De Meyer Albert
80. » Ribschi Ludoviko
82. » Göhr Arthur
85. » Pruvot Eugène
86. » Peeters Joseph
88. F^o Verpelt Jeanne
89. » » Alice
90. S. Van Melckebeke R.
91. F^{no} Herickx Gabrielle
92. S. Georges René
93. » Goedvriend Georges
102. » Baesens Abel
105. » Minten Alphons
106. F^o Backer Anna

107. » Jacques Jeanne 282. S^{no} » »
 108. S. Vinck Constant 283. F^o » »
 109. F^o Wuyts Rosa 284. S^o » » junior
 122. S. Schoofs Frans *Bruges*
 123. Paco Grupo Katolika 100. F^o Thoorens Ivonne
 135. S. Dillen Jean 121. Bruĝa Grupo
 136. » Simons Domien 118. S. Witteryck
 139. » Basteyns Edmond Liga prezidanto
 140. » Jacobs Jean 119. S^{no} Witteryck
 141. » Meerbeeck Robert 120. F^o Le Dène
 142. » D^{ro} Vander Biest 317. S^{no} Demuyne Oct.
 143. S^{no} » *Bruxelles*
 156. S. Van Remortere Jos. 33. S. Abato Richardson A.
 157. » Dercken Louis 97. » Minon-Bocquet
 158. » Lommaert Edward 98. S^{no} » »
 160. » Champy Leon 101. S. Craps J.
 180. » Dekepper Gommaire 167. F^o Moreau
 194. » Tuyls Octave 235. » Jennen
 195. » Derckx Joseph 236. S. »
 250. » Swaelf Joseph 237. S^{no} »
 251. F^o » 309. F^o Schmidt
 252. » Champy Elza 310. S. Philippens
 320. » Delsaux Jeanne 311. F^o Larcier
 321. » » Camille 312. S. Matthieux
Anderlecht
 239. S. Haine E. 327. S. Dervaux Sylvain
 240. » Dejaegher E. *Charleroi*
Beyne Heuzay
 166. S. D^{ro} Dupont 164. F^o Hallet Alice
Borgerhout 165. S. » Desire
Eecloo
 36. F^o Possenaer Marie 154. S.
 38. Grupo Espero. *Gent-Gand*
 58. S. Versluyzen Ferdinand 39. F^o Schepens
 61. Carris Joseph 43. S. Van Cleemput Flor.
 87. Verwilligen Frans 46. F^o Collyn Eugénie
Boom 47. » » Adrienne
 84. S. Vande Velde Alph. 48. S. Vermandere Gust.
Bilsen 111. F^o Standaert Olympe
 281. S. Ganton Georges 112. » Declerck Hélène

113. » Van Hyfte Suzanne 319. » Acart A.
 114. » Verschueren Claire 330. » Blanchart Elodie
 116. S. Petiau Henri 331. » Combes Madeleine
 Sekretario de 332. S. Boone André
 l'kongresa-semajno *Gendbrugge*
 124. F^o Verlent Ivonne 41. S. De Bruyker Oscar
 125. » De Vlieghe Irma 42. » Barbe-De Kneef
 128. S. De Bruyker Pierre 49. » Vaerendonck L.
 129. F^o Cosyns Elodie 138. » Martens Joseph
 130. » De Loof Alice 223. F^o Dejaeger Emma
 131. » » Germaine 253. S. Patoor Oscar
 132. S. Snissaert Emile 211. » De Bruyker Leon
Ixelles
 133. » Servranck R. 44. S. Vandrunen Jamer
 147. » Maertens Albert 45. » Augustin
 Honora prezidanto
 de l'kongresa-semajno 228. S. Dhaenens
Knocke
 148. F^o Casteels 186. F. De Luyck Marie
 149. S. Vanveerdegem Fr. *Ledeberg*
 150. F^o » Germ. 219. S. Desmedt Raphaël
 155. S. Duyckers Charles 220. » Romain
 170. » Vander Cruyssen F. *Lembeke*
 171. » D'Haen Firmin 126. S. Van Acker Auguste
 172. » Verstraete Jos. *Lierre*
 179. » Colardin Gustave 163. S. Leflot Joseph
 181. F^o Combes Marie 324. Debecker Albert
 182. » Haelman Gabrielle *Liège*
 196. S. Fouquet Joseph 168. F. Poncin Pauline
 197. F^o » Josephine 169. » Eugénie
 198. » Van'loo Alice *Mechelen*
 199. » » Jeanne 145. S. Vandeveldé Jean
 200. S. Verbeke Alphonse *Melle*
 212. F^o Sprangers Germ. 256. S. Mast
 217. » Schepens Yvonne
 218. » Deneck E.
 221. S^{no} Van Hove *Mont-Saint-Amand*
 255. F^o Cruyt Céline 40. S. Sebruyens Michel
 279. » Nachtergaele Jul. prezidanto de l'semajno kon.
 307. » Fouquet Blanche 115. S. Simonis Ernest
 308. » D'Hossche M.-L. 183. F. Arickx Marie

201 » Standaert Martha
 231. S. Bauwens Edouard
 278. » Vandevyver Gaspard
Namur
 152. S. Dorsingfang I.
 153. » » L.
Spa
 246. S. Borchmans G.
 247. F. » Jeanne
 248. » Letiexhe Catherine
St. Gilles
 241. S. Mouton
St. Mariaburg
 56. S. Vermandel
 57. S^{ino} »
 104. F. Thiels Marie
Schaerbeek
 146. S. D'Artois Emile
Uccle
 238. S. Geronnez A.
Verviers
 249. S. Rommel Ferd.
Zelzaete
 144. S. Declerck

FRANCUJO

Arras

204. S. Barrat
Armentieres
 229. S. Briquet Maurice
 230. » Pellet du Planty
Amiens
 184. S. Verot André
Beziars
 96. F. Flourens
Bourges
 117. F. Desserin Gabrielle

Castreaux

94. S. Botte
Cholet
 315. S. Le Large Gaston
Douai
 206. S. Steyn Ernest
 207. F. Le Blanc Ivonne
 208. S^{no} »
 209. S. Humez Albéric
 222. » Coppy Henri
Escout-Pont
 202. S. Grenier Charles
Fresnes
 173. S. Richez - Renaud
Nogent s / marne
 76. S. Prud'hon Georges
Noyelle s/Escout
 205. F. Monciaux Thérèse
Lille
 52. S. Barrat
 280. » Commère Henri
 203. F. Le Leux Marie
Lyon
 137. S. Drudin F.

Paris

51. S. Rollet de l'Isle
 67. » Gabriel Chavet
 68. » Karlo Bourlet
 69. F. Bonnet Fanny
 71. S. Le Moine Eugène
 72. » Chaigneau Camille
 73. » Gillet Gaston
 74. F. Royer Cécile
 75. S. Leprieur Auguste
 81. » Colas Claudius
 314. » de Sousa Lisboa
 325. » Chausegros F. V.
 326. F. Gerard

Rosult

213. S. Lacquement Louis
Sebourg
 53. F. Florent Odile
St. Maur les fosses
 328. S. Boullay Esther
 329. » Tiard Marcelle
Valenciennes
 313. S. Barret
 GERMANUJO.
Aachen
 316. S. D^{ro} Rothsuh
Wiesbaden
 243. S. Fürh Camille
 NEDERLANDO
Amsterdam
 286. S. Swaap Willem
 287. » Block Herman
Haarlem
 185. S. Vanden Eynde J.D.
Tilburg
 214. F. Amelsdorf
 HONGARUJO.

Peçs

210. S. Julius Lajos
Budapest
 127. » Vörös Cyrille
 PORTUGALUJO
Lisboa
 151. S. Damajo Ernest
 RUSUJO
Krakovo.
 66. S. Odo Bujwit
Kovno
 83. » Miĥajloviç Aleksand.
Moscou
 254. S. Smirnov Michaelo
Saratov
 110. » Davidov Georges
 SVEDUJO
Kristiania
 103. S. Riffling Bruno.



Internacia

ESPERANTISTA SEMAJNO-KONGRESO

GENTO 14-20 Aŭgusto 1913.

Alta Protektanto :

Lia Majesta Moŝto ALBERTO, Reĝo de la Belgoj.

Honoraj Prezidantoj :

Sinjoroj

Barono de Kerkhove d'Exaerde, provincestro.

Emile Braun, urbestro.

Generalo H. Sebert, prezidanto de l'Konstanta komitato de la kongresoj.

A. J. Witteryck, prezidanto de la Belga Ligo Esperantista.

Honoraj membroj :

Sinjoroj

D^o L. L. Zamenhof.

C. W. Bolton, urbestro de Eastbourne.

H. Boddaert, advokato, ĝenerala sekretario de la Ekspozicio.

Carlo Bourlet, vicprezidanto de la Konstanta komitato de la kongresoj.

Léon Champy, ĝenerala sekretario de la Belga Ligo Esp.

L. Delvaux, vicprezidanto » » »

Fern. Mathieu kasisto » » »

H. B. Mudie, prezidanto de U. E. A,

D^{ro} John Pollen, 3, Victoria street, Londono.

Abato Richardson, vicprezidanto de la Belga Ligo Esperantista.

Kolonelo G. S. Robinson, prezidanto de la Esperanto-Grupo de Eastbourne.

R. T. Thornton, J. P. vicurbestro de Eastbourne.

Oscar Van Schoor, ĉefredaktoro de "Belga-Esperantisto",

ORGANIZA KOMITATO :

Honora prezidanto.

Albert Maertens,

Vicprezidanto,

Arthur Vermandel,

Vicprezidanto,

Willy Ernst.

Helpsekretario,

Florent Van Cleemput,

Helpkasisto,

Jules Barbe,

Direktorino de la loĝa komitato,

F^{no} R. Schepens.

Prezidanto,

Michel Sebruyns,

Vicprezidanto,

Oscar De Bruyker.

Ĝenerala sekretario,

Henri Petiau,

Kasisto,

Joseph Fouquet,

Komitatanoj : *Ernest Simonis, Gustave Vermandere*.

PROGRAMO

Merkredon 13^{an} de Aŭgusto :

2^a p. t. m. Malfermo de la akceptejo en la komunuma lernejo por Fraŭlinoj; *Rue des Foulons (Voldersstraat,) n^o 7.*

Ĵaŭdon 14^{an} de Aŭgusto :

9^a ĝis la 12^a matene. 2^a ĝis la 6^a vespere akcepto de la konhresanoj en la akceptejo.

8^a vespere : Intima kunveno en la Ekspozicio.

Vendredon 15^{an} de Aùgusto :

10^a matene. Malfermo de la kongreso en la Palaco de l'Festoj en la Ekspozicio.

3^a p. t. m. Vizito de la urbo kaj de la Ekspozicio.

7^a vespere. Teatra prezentado en la Flamanda Teatro.

Sabaton 16^{an} de Aùgusto :

10^a matene. Kunveno en la Akceptejo.

12^a t. m. Akcepto de la kongresanoj en la urbdomo.

3^a p. t. m. Vizito de la Ekspozicio.

8^a vespere. Koncerto kaj vespermanĝo en « **Rathskeller** » (Belfrido.)

Dimanĉon 17^{an} de Aùgusto :

10^a matene. Ĝenerala labora kunsido en la Palaco de l'Festoj.

3^a p. t. m. Vizito de la urbo kaj de la Ekspozicio.

7^a vespere. Teatra prezentado en la Flamanda Teatro.

Lundon 18^{an} de Aùgusto :

10^a matene. Ferma kunsido de la kongreso. (Palaco de l'festoj.)

1^a p. t. m. Festmanĝo en la « Komerca Borso » Place d'Armes-Kouter.

9^a vespere. Internacia balo.

Mardon 19^{an} de Aùgusto :

10^a matene. Vizito al la Ekspozicio.

3^o p. t. m. Festa disdono de la premioj al la gajnintaj de l'konkurso, en la palaco de l'festoj.

8^a vespere. Koncerto en la " Malnova Flandrujo „

Merkredon 20^{an} de Aùgusto :

10^a matene. Vizito al la Ekspozicio.

3^a p. t. m. » » »

8^a vespere. Adiaŭa intima kunveno en la Ekspozicio.

Stedelijke Openbare Bibliotheek

Guido Gezellestraat

8500 KORTRIJK

ESPE

INTERNACIA SEMAJNO.....

KONGRESO

Gent 1913

Kongreslibro

74/ 2388

4.48 74.

Manufakturejo de
Tabakoj & Cigaroj
Halleux - Gulikers
9, Rue Pied du Pont des Arches
LIÈGE. (BELGUJO)



Fabrikejo de la bonega cigaro « ESPERANTO »
kiun ĉiu Esperantista cigaramanto « DEVUS » gastum

Tiu ŝatinda cigaro estas aĉetebla en la akceptej
dum la Esperantista Semajno en Gento.

ES

05